### TEJO serĉas volontulon!

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 6-9 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze eblas) ekde januaro/februaro (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por sendi vian kandidatiĝon estas la 28a de decembro 2011. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1399

### Novaĵletero de "Movado sen nomo" aperis

Nia nova slogano "Atentu viajn pensojn..." spekteblas en nia rethejmo http://www.movado-sen-nomo.org/ kaj en nia forumo http://msn.ipernity.com .

En nia retejo elŝuteblas ankaŭ la kalendaro por 2012. Eblas rekte pendigi ĝin sur muro, aŭ faldi ĝin por fari triangulon kiu povas stari sur via labortablo (post fikso de la faldita paĝo per glubendo).

Ni deziras al vi gajan jarfinon en agrabla familia etoso kaj bonan komencon de la nova jaro!

Korajn salutojn de la teamo de Movado sen Nomo!

### Por la 125 Jubileo de Esperanto - nova libro de ISTK-AKB

ANKAŬ VI ESTAS FREMDULO kaj STUDPROGRAMOJ de ISTK/AKB

Okaze de la 152-a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof – Internacia Tago de Esperanto-Libroj, kadre de Zamenhofaj Tagoj en BYDGOSZCZ estis eldonita de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz la nova 252-paĝa lernolibro de ISTK/AKB-AIS-Klerigejo Bydgoszcz verkita de d-ro Przemysław Paweł Grzybowski el Universitato Kazimiro la Granda en Bydgoszcz (190 paĝoj) plus kvar suplementoj de la Studprogramoj de ISTK/AKB en Bydgoszcz (67 paĝoj). La valora lernolibro estas jam aĉetebla ĉe ISTK en Bydgoszcz. Ĝi kostas 5 EŬRO + 5 EŬRO sendokostoj = 10 EŬROJ. Aldone por 5 EŬRO eblas ankorau ricevi la libron "Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo" kun koloraj mondmapoj en Esperanto kaj libro "Esperanto en Bydgoszcz-pli ol 100 jaroj" – do la tuta sendaĵo kostas 15 EUR. Krome eblas ankau aĉeti la du volumojn de vortaro ESPERANTO-ANGLA-POLA de Edward Kozyra por 10 EŬRO kaj + 5 EŬRO sendokostoj = 15 EUR. Do entute promocie ĝis la 31.12.2011 la du libropakaĵoj (4+3=7 libroj) kostas nur 30 EŬRO kun sendokostoj pageblaj por la konto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo.

Ĉion la plej bonan en la NOVA 2012 JARO bondeziras

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz

rete: esperanto-turismo ĉe wp.pl , info ĉe esperanto.bydgoszcz.eu kaj andreo ĉe rubikon.net.pl

paĝoj: http://www.esperanto-studium.za.pl , http://www.esperanto.bydgoszcz.eu, http://www.esperanto-turismo.za.pl

### En la 76a elsendo de Varsovia Vento

En la 76a elsendo, la 15an de decembro!, Zamenhofa-Festo laŭ Varsovia Vento, muzika intervjuo kun Anjo Amika kaj sinprezentado de la TEJO-estraro. Bonan aŭskultadon! http://www.podkasto.net

### [esperantic.org] Eventoplena jaro por ESF

*Malsukcesa elŝuto.*

### Esperanto-Klubo Sudtirolo rekomendas: Amikaro de TATOEBA

Popularigu la japanan frazokolekton TATOEBA: http://www.causes.com/causes/565140-amikaro-de-tatoeba

## TEJO serĉas... novan redaktoron de TEJO-Tutmonde!

Ĉu vi ŝatas ĵurnalismon? Ĉu vi interesiĝas pri la internacia junulara E-movado? Fariĝu redaktoro de TEJO-Tutmonde, kaj helpu ĉiam liveri aktualajn, interesajn informojn pri kio okazas en TEJO kaj en ĝiaj Landaj Sekcioj.
TEJO-Tutmonde nun
Iam oficiala gazeto de la organizo, TT nun konsistiĝas el 3 malsamaj eroj:
- Kvar-paĝa rubriko ene de la revuo Kontakto (6 foje jare)
- Unu-paĝa rubriko ene de revuo Esperanto (ĉiumonate, krom en aŭgusto)
- Blogo ĉe tejo.org (regule ĝisdatigata)
Kiujn taskojn havas la redaktoro?
La redaktoro respondecas pri la regula aperigo de artikoloj en la supre menciitaj informiloj. Legu pli:
http://tejo.org/eo/node/1404

## Kristnaska Viro respondas en Esperanto

Kiel kutimas, la 1-an de decembro oni skribas leterojn al Kristnaska Viro. Skribu al li! Kaj li respondos al vi! Li kapablos tion ankaŭ en Esperanto!

Ni invitas do ĉiujn esperantistojn, kaj junajn, kaj spirite junajn, partopreni la tradicion skribi al Kristnaska Viro. Simple sendu permane skribitan leteron (en Esperanto memkompreneble) al la adreso:

AVO FROSTO

NORDA POLUSO

KANADO, CANADA

HOH OHO

Kristnaska Viro preferas permane skribitajn leterojn, eĉ se ilin skribus malgrandaj manetoj, kiuj nur lernas skribi.

Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1393

## Dankon kaj sezonajn salutojn

Karaj legantoj, dankon por via fida legado de TEJO-aktuale en tiu jaro kaj espereble ankaŭ estontece. TEJO-aktuale nun paŭzas ĝis januaro. Mi deziras al vi ĉion bonan por la festotagoj kaj feliĉan novan jaron 2012. Julia Noe, redaktorino de TEJO-aktuale.

## Venontaj renkontiĝoj

Komune festi la Novan Jaron: 10-a Novjara Renkontiĝo kaj 3-a Novjara Internacia Semajno, Bitburg/Germanio, de la 27-a de decembro 2011 ĝis la 3-a de januaro 2012 http://www.esperantoland.org/nr

28-a Internacia Festivalo - en Xanten - internacia etoso - renoma aranĝo - alloga programo, 27.12.2011 ĝis 3.1.2012, Germanio http://www.internacia-festivalo.de

JES: 27a de decembro 2011 ĝis 1a de januaro 2012, Gdansk, Pollando http://jes.pej.pl/

Jarfina Festo+Silvestra Festeno == 27.dec-02.jan.2012 == en franca E-kastelo Greziljono http://gresillon.org/jarfino

Seminario SANO-2 (28.12.11 - 02.01.12) en Herzberg - la Esperanto-urbo http://esperanto-urbo.de (multlingva)

2012

NOVA - Novjara Aranĝo de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) inter la 11-a kaj la 15-a de januaro 2012, Formiga, subŝtato Minas-Ĝerajso, Brazilo http://novjaraaranĝo.wordpress.com

32-a BEJK, Brazila Esperantista Junulara Kongreso, inter la 15-a kaj la 19-a de januaro 2012, Taguatinga, Brazilo http://www.bejo.esperanto.org.br/

70a Regiona Staĝo de Esperanto, 23 / 24 / 25-an de marto 2012, LA PETITE PIERRE, Francio http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr

28a Printempa Semajno Internacia (PSI), 2a ĝis 9a de aprilo en Bonn, Germanio http://esperanto.de/psi

IJF - Internacia Junulara Festivalo 2012, 4a de aprilo ĝis 10a de aprilo 2012, Cattolica, Italio http://iej.esperanto.it/ijf/2012

PRINTEMPE 2012, ĉ. 5-a ĝis 12-a de aprilo 2012 http://www.esperantoland.org/printempe

Krokodila Renkontiĝo, 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012, Arrout, suda Francio / Okcitanio http://krokodila2012.wordpress.com/ aŭ krokodila2012 ĉe gmail.com

Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso 19.05.2012 - 25.05.2012 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo http://ifk64.esperanto-urbo.de

TEATRO-STAĜO de la 7-a ĝis la 17-a de julio 2012 en Minsko, Belarusio http://www.morgaulaprintempo.eu

9-a kongreso de EEU 2012, 16a ĝis 20a de julio 2012, Galivo, Irlando http://eeu-kongreso.webnode.com/

Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012 http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2

IJK 2012, 5a ĝis 12a de aŭgusto 2012 en Nara, Japanio http://www.tejo.org/ijk

79a Kongreso de Esperanto 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012, Mazaradelvalo, Sicilujo, Italujo http://kongreso.esperanto.it/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu